

Wilhelm Müller,

## La tilio

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Ĉe l'puto antaŭ l'urbo  
Jen staras la tili',  
En kies ombro dolĉe  
Revadis ofte mi.  
En ĝia ŝel' tranĉite  
Vidiĝas ama dir',  
Kaj daŭre min altiras  
Al ĝi la korsopir'.

Hodiaŭ, ĉe noktmezo  
Mi pasis ĝin, migrul',  
Ho! Spite la malhelo  
Fermiĝis la okul'.  
Sed ĝiaj bonaj branĉoj  
Alvokis ŝajne min:  
"Alvenu, ho junulo,  
Ni repacigos vin!"

Alblovis vent' malvarme  
Kun granda energi',  
Ĉapelon ĝi fortiris,  
sed ne turniĝis mi.  
Kaj nun, post kelka mejlo  
De interspaco, ho!  
Ankoraŭ bruas l'arbo.  
"Ĉe mi paciĝu do!"

*Traduko de la Germana poemo "Der Lindenbaum" de WILHELM MÜLLER (\*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

*Arg-83-166 (2014-05-31 14:26:54)*

*Tio estas la origina tradukversio de L. E. MEIER. Ĝi troviĝas en la kantlibreto "Esperantista Kantaro", kiun eldonis HANS TH. HOFFMANN en 1907 en sia eldonejo en Berlino, Steglitzer Str. 44. Tiu ĉi esperantigo troviĝas ankaŭ en [http://kantaro.ikso.net/la\\_tilio](http://kantaro.ikso.net/la_tilio). Vidu ankaŭ: <http://194.95.59.225/index.php?id=3623>.*

Wilhelm Müller,

## Ĉe put' antaŭ pordego

*tradukita de Joachim Gießner*

Ĉe put' antaŭ pordego  
jen staras la tili'.  
En ĝia ombro dolĉe  
ja ofte revis mi.  
Mi tranĉis karajn vortojn  
en ĝia kruda ŝel'.  
En ĝojo kaj doloro  
ĝi restis mia cel'.

Mi devis pretermigri  
dum nokta obskurec'.  
Mi fermis la okulojn  
en nigra malhelec'.  
Kaj kvazaŭ min vokante  
la branĉoj muĝas jen:  
"Ĉi tien vi nur venu  
kun via korĉagren'."

Malvarma vento blovis  
dolore kontraŭ mi.  
De l' kap' ĉapel' forflugis,  
ne turnis mi al ĝi.  
Nun malproksima estas  
mi for de la tili',  
sed vokas ĝi: "Nur venu,  
trankvilon trovos vi!"

*Traduko de la Germana poemo "Der Lindenbaum" de WILHELM MÜLLER (\*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25) en 2001-11.*

*Arg-83-165 (2003-12-28 22:58:15)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro "Mia kantaro I", kiun eldonis JOSEF SCHIFFER (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio) en 2001.*